

## Leteroj de du interlingvistoj en la komenco de la dudeka jarcento

de Carlo MINNAJA, Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (RSM) kaj Universitato de Padova (IT)

Pri la rilatoj inter Giuseppe Peano (1858-1932) kaj Alexandre Louis Couturat (1868-1914) aperis disverstempe kaj diversloke pluraj kontribuoj, parte videblaj en la ampleksa arkivo de Peano, parte czerpitaj el la dokumentoj de la *Délégation pour l'Adoption d'une Langue Auxiliaire Internationale*, delegacio en kiu estis forte engaxita Couturat, kaj, kvankam ne tuj de la komenco, ankaux Peano. Aperis lastatempe, redaktita en la itala, la tuta leteraro inter la du sciencistoj (Luciano e Roero, 2005; Minnaja, 2007), decida mejlosxtono pri la koncerna temo. La verko ampleksas cxiujn leterojn de Couturat al Peano en la koncerna periodo, entute 97, gardatajn en la "Arkivo Giuseppe Peano" de la komunuma biblioteko de Cuneo kaj cxe la Urba Muzeo de Cuneo, urbeto en regiono Piemonto kie Peano naskigxis. La verko entenas ankaux kvar leterojn de Peano al Couturat; kial cxi mispropocio? Cxar tiuj ricevitaj de Peano konservigxis, dum tiuj ricevitaj de Couturat perdigxis: restas nur, en la arkivo de Peano, kvar malnetoj de liaj leteroj al Couturat. Sed tio kio mankas estas anstatauxata de tre ampleksa kaj kompetenta komentario: 70-pagxa enkonduko plus amaso da notoj verkitaj de la du auxtorinoj, Erika Luciano kaj Clara Silvia Roero. Ambaux, diversrole, agas en la universitato de Torino, kaj estas la plej kompetentaj pri la arkivo de Peano, kiun ili trakribis folion post folio.

Je la tempo kiam komencigxas la leterintersxangxo Peano estas jam fama orda profesoro pro infinitezima analitiko cxe la Universitato de Torino, sed liaj interesoj estas ege vastaj kaj arkas tra diversaj fakoj, de strikta matematiko al logiko, al lingvistiko: cxi lasta intereso etendigxos kaj specialigxos poste al interlingvistiko (Roero, 2002). Lia skolo konsistas el pluraj personoj, ne cxiuj atingintaj universitatan postenon, ofte instruistoj cxe supera mezlernejo, ligitaj al li per kunlaboroj diversaj: ili venas al kongresoj kune kun li kaj iliaj prelegoj estas alte taksataj. Unu el ili, Alessandro Padoa, kiu studis ingxenierarton en Padova kaj poste doktorigxis pri matematiko en Torino per tezo patronata de Peano, igxis unu el la plej gravaj italaj logikistoj de tiu periodo. Interesa estas la fakto, ke Peano partoprenas kaj la kongresojn pri filozofio, kaj tiujn pri matematiko, kaj, stimulte de Couturat, unu de Esperanto.

Cxi leteraro estas nur parto de la grandioza leterintersxangxo de Peano. Ekzistas de li la korespondado kun Cesaro kaj Amodeo, Vacca, Pieri, Vitali krom pluraj disaj leteroj al aliaj; Peano korespondis kun pli ol 600 personoj, tiel ke kompleta leteraro ankoraux estas organizota kaj studota. Kompreneble inter liaj korespondantoj pluraj estis interlingvistoj, kaj el tiuj kelkaj igxis konataj inter la esperantistoj, kiel Bruno Migliorini kaj Ernst Drezen. De Migliorini ekzemple estas konservitaj ses posxtajtoj: en la unua Migliorini kiel juna studento sin deklaras interesita al interlingvistiko sed jam esperantisto kaj petas de Peano brosxuron pri *latino sine flexione*; en la kvara Migliorini, plurajn jarojn poste, estas jam konata lingvisto, kiu sendas kontribuajxon por revuo redaktita de Peano.

Alexandre Louis Couturat (1868-1914) estas filozofo, dek jarojn pli juna ol Peano, sed kun famo malpli granda. Li instruas en la universitatoj de Tuluzo kaj Caen, malpli prestigxaj internacie ol tiu de Torino, sed li jam auxtoris plurajn gravajn verkojn pri logiko. Tute specife, per diversaj artikoloj de la jaroj 1899-1900 li enkondukas en sian landon la logikon kiel komprenatan en Euxropo; plurfoje li faras amarajn konsiderojn pri la franca kulturo koncerne logikon kaj matematikon, kvankam certe elstaraj matematikistoj francaj ne mankis tiutempe: sed la averagxa panoramo sxajnis al Couturat ege postrestinta. Couturat estas ege respektama al la kolego, liaj leteroj montras afablajn esprimojn ne nur formalajn. La leteroj estas en la franca, lingvo tiam kutime konata de la kleraj italoj. De Couturat ne multo estas studita, kvankam ekzistas lia plena leteraro kun Bertrand Russell kaj kelkaj leteroj al Pieri kaj al Vacca. Couturat doktorigxas per latinlingva tezo pri Leibniz, kaj al la Leibniza logiko li dedixas poste gravan verkon. Cxi verko ne ricevas absolute senkondicxan aprobon: nur Russell gxin lauxdas senrezerve, Peano havas iujn kritikojn, iuj francaj fakuloj esprimas multe pli konsistajn dubojn.

La publikigita leteraro havas ankaux dek kvin kromajn erojn: temas pri leteroj de (aux al) aliaj matematikistoj pri la samaj temoj, plus la ama nekrologo verkita de Peano por Couturat, tragike mortinta en stratakcidento, kiam lia auxtomobilo estis trafita de kamiono portanta al francaj militaj korpusoj la sciigon, ke Germanio estis deklarinta militon al Francio: estis la dua tago de la unua mondmilito. Tiu nekrologo aperis ankaux en *Revista universale* redaktita de Peano. Estas ankaux reproduktitaj la dankesprimoj de la vidvino, s-ino Marie Joséphine Racine Couturat.

La leteroj startas en 1896 kaj gxis 1899 rilatas al logiko. Peano estis eldoninta sian *Formulaire de Mathématiques*, kiu montris la validecon de la matematikaj formuloj kiel internacia signaro. Tiu verko enkadrigxis en lia ideo, ke la tuta matematiko, kaj aparte la logiko, estas skribebla en formaligita maniero tiel ke gxi povu esti komprenata de cxiuj, sendepende de ilia lingvo. Tiu *Formulaire* estis komence publikigita en franclingva revuo eldonita kaj mastrumita en Torino cxe fratoj Bocca, *Revue de mathématiques*, ekde 1893, kaj gxi estis tre lauxde konsiderata; Vailati kaj Pieri, italaj matematikistoj, vidis en la matematika logiko la realigon de la revo de Leibniz, laux kiu la *logique mathématique est destinée à provoquer dans ce genre d'études des progrès analogues à ceux qu'a produits dans les recherches physiologiques l'introduction du microscope* (Vailati, 1899). Couturat siaflanke estis kunlaborinta en la reviziado de la provajtoj de la *Formulaire* kun la entuziasmo de scienculo, kaj en letero al Peano (1 okt. 1899) li esprimas sian finan

saluton tiamaniere: *C'est dans ces sentiments de confraternité scientifique et philosophique que je vous prie d'agréer l'assurance de mon respectueux dévouement.*

Sed en 1900 la leteroj havas kiel temon preskaux nur la internacian lingvon. En majo 1900 disvolvighas en Parizo la Universala Ekspozicio; samjare Couturat, kune kun sia matematika kolego Léopold Leau, kiun li konis ekde la kuna sperto kiel studentoj cxe École Normale Supérieure, organizas la Unuan Kongreson de Filozofio, kiu okazas en Parizo en la unua semajno de auxgusto. En tiu kongreso la problemo de lingvo internacia por la scienco estas metita sur la tablon. La postan semajnon, dum la senpere sekvinta dua kongreso de matematikistoj, Leau same prezentas la problemon. Estis vere la tempo de la propono de la grandaj problemoj: en tiu sama matematika kongreso la germana matematikisto David Hilbert (1862-1943) prezentas la 23 fundamentajn problemojn kiuj oni solvu dum la dudeka jarcento<sup>1</sup>. Komencighas do vasta kaj profunda esploro pri la fundamentoj de matematiko, kaj en tiu esploro ankaux internacia lingvo bazita sur fundamentaj logikaj konceptoj trovas siajn favorantojn.

Couturat kaj Leau fondas fine de 1900 la *Délégation pour l'Adoption d'une Langue Auxiliaire Internationale* (DALAI), kiu havu la celon instigi la cxefajn kulturajn instituciojn interesigxi pri la problemo de la lingvo internacia. Post favoraj aux duonfavoraj rezolucioj de sciencaj kongresoj, kiuj nomumas ankaux delegitojn kiuj tiujn sciencajn komunumojn reprezentu en la tiucelaj iniciatoj, estas akceptita rezolucio, ke la Societo de la Akademioj, fondita en 1900, kuniganta dudekon da gravaj akademioj, estu sxargxita per la tasko elekti kiu estas la plej bona internacia lingvo por la diskomunikado de la scienco. Couturat klopodas per internacia peticio (Roero, 1999) akiri la favoron de diversaj sciencaj asocioj, inter ili la *Association Géodésique Internationale*, kiu havas plurajn italajn membrojn; tial en 1904 li skribas al Peano petante ke li favore menciu al ili la laboron de la DALAI kaj akiru ilian apogon. La demando estas prokrastata de unu kunsido al la alia, kaj fine gxi staros en la tagordo de la tria gxenerala asembleo de la Societo de la Akademioj, kunvenonta en Vieno en majo 1907; la Viena Akademio iniciatos rezolucion tiuteman, kaj la Kopenhaga Akademio gxin apogos. Por tiu rezolucio la DALAI kolektos subskribojn de institucioj kaj de unuopuloj, kaj la fina kalkulo montros 307 asociojn kaj 1251 sciencistojn, inter kiuj plurajn italojn. En decembro 1906 Couturat kaj Leau sendas cirkuleron por difini la iniciatojn de la Societo prepare al la gxenerala kunveno, kaj la cirkulero mencias specifan decidon de la DALAI kiu ekskluzivas de la DALAI mem la inventintojn de artefaritaj lingvoj.

Couturat ne iluziighas, ke la akademioj solvos la demandon, kaj, antauxvide al tiu ebleco, la fondodokumento de la DALAI estis fiksinta, ke, se la Akademioj ne faros la elekton, tio estos komisiita al iu Komitato nomumota de la DALAI mem. Tial Couturat, jam antaux la kunveno de la Societo de la Akademioj, komencas agi por la kunmeto de tia Komitato. Efektive, dum sia kongreso en majo 1907 la Societo de la Akademioj fortunatas de si la taskon. Por doni auctoritatecon al la Komitato kaj sekve almenaux minimuman sxancon, ke gxiaj decidoj estos poste plenumataj, Couturat klopodas akiri la aligxojn de famaj personoj. La Komitato estu kunmetita ankaux surbaze de diverseco de landoj kaj lingvoj kaj gxin partoprenu ankaux reprezentantoj de la diversaj artefaritaj lingvoj aux lingvoprojektoj, tamen ne mem inventintoj. Da tiaj projektoj, kiujn la Komitato nomumita de la DALAI devis ekzameni, estis cxirkaux dudeko; inter ili la plej sxancohava estis Esperanto, kiun Couturat varme porpledis, kvankam kelkaj lingvistoj, inkluzive de Peano, havis plurajn rezervojn kontraux gxi. Fakte Peano, en longa letero al Charles Méray (25 jul. 1900), estis jam espriminta fortajn kritikojn al Esperanto, kvankam li agnoskis, ke gxi *est le plus scientifique que toutes les autres langues artificielles*. Inter la ekzamenotaj projektoj estis ankaux la *latino sine flexione* iniciatita de Peano en 1903, poste nomota *Interlingua*; tial principe Peano estis ekskluzivita de la partopreno kaj en la DALAI kaj, ecx pli, en la Komitato (Barandovská-Frank, 2002).

Sercxe al itala membro de la Komitato, Couturat denove petas helpon de Peano, indikante al li liston de eblaj italaj interesigxantoj. Li sugestas ke temu prefere pri ano de la itala nacia akademio, en kiu Peano ja membras, kaj li mencias la nomon de Giuseppe Veronese, profesoro en la universitato de Padova, ne sciante aux eble ne memorante, ke inter Veronese kaj Peano estis, dek kvin jarojn antauxe, neplacxa polemiko pri iuj geometriaj teorioj de Veronese, kiujn Peano draxis. Tamen la nomo de Veronese ne estis tute hazarde menciita, cxar Veronese sidis sur la katedro lasita de Giusto Bellavitis, kiu siavice estis granda favoranto de internacia lingvo kaj estis mem produktinta en 1962 kanvason da principoj, kiuj devus regi internacian artefaritan lingvon (Bellavitis, 1862). Tre versxajne Peano ne donis la esperitan helpon, kaj cxuikaze la klopodoj de Couturat partoprenigi italon en la Komitato fiaskis. Tial, por havi italan membron, estis alvokita en la Komitato gxuste Peano, kvankam mem auxtoro de projekto de lingvo internacia kaj do principe ekskluzivinda. Ankaux la aliaj membroj (entute 14) estas famuloj, de Boirac al Ostwald, de Baudoin de Courtenay al Jespersen.

Malgraux, aux eble pro, la partopreno de Peano en tiu Komitato, la rilatoj inter li kaj Couturat komencas fendigxi. La Komitato kunsidas dek ok fojojn, inter la 25a de junio kaj la 24a de oktobro 1907, kaj fine adoptas Esperanton, sed kun kelkaj ne malesencaj modifoj, kiuj fakte faras gxin alia, kaj tiu *Esperanto modifita* nomigxos *Ido*. Peano pro ekzamenoj devas reveni pli frue al Torino kaj ne partoprenas la finan vocxdonon (Barandovská-Frank, 2006). La pleja engaxito en la tuta afero dum pluraj jaroj ekde la komenco, Couturat, flegas la esperon, ke la esperantistoj, kiuj estas sendube la plej

<sup>1</sup> Kelkajn oni solvis, kelkajn oni agnoskis nesolveblaj, kelkaj aliaj estas ankoraux studataj.

granda aro da adeptoj de internacia lingvo, akceptos la modifojn, sed la intertraktadoj tiucelaj fiaskas, kaj Couturat, kiu antaŭe estis entuziasma esperantisto, farigxas entuziasma idisto, fondas Ido-lingvan revuon *Progreso*, kaj klopodas kuntreni sur la saman vojon Peano-n. La modifoj, kiuj kondukas al Ido, ne kontentigas Peano-n, kiu plu uzas kaj propagandas sian *latino sine flexione*. Couturat riprocxas lin pro tio, cxar la decido de la Komitato devus teni cxiujn al gxia respekto, minimume tiujn kiuj partoprenis en gxiaj laboroj. Peano do estas akuzita pri misagnosko de la laboroj de la Komitato mem, malgraŭ ke li membris en gxi. Sialflanke la esperantistoj firme kontraŭis la decidojn de la Komitato: la favorantoj de Esperanto estis jam sufcxe multaj kaj jam farigxis konservativuloj, tiel ke la modifoj proponitaj ne estis akceptitaj. Cetere oni devas agnoski, ke Esperanto havis jam pli ol dekkvinjaran vivodaŭron, kaj gxi estis firme establita. Tiom firme, ke la Universala Kongreso de 1905 en Boulogne-sur-Mer estis adoptinta la triverkan kompleton *Fundamento* kiel netusxeblan lingvan bazon; la esperantistoj do konsideris Couturat apostato. Aliflanke la sinteno kaj la agado de Peano donis al Couturat plian kauxzon de malgxojo, cxar, kvankam de kontraŭa flanko, li kunigxis kun la esperantistoj en la sabotado de la decidoj de la Komitato kaj do de la longa kaj pena laboro de la DALAI entute. En letero al Peano (1 januaro 1910) li plendas (Luciano e Roero, 2005):

*Je constate de plus en plus que votre action, purement négative et dissolvante, fait la joie des Espérantistes fanatiques, qui l'exploitent contre nous, contre l'œuvre du Comité dont vous avait fait parte.*

Pri tio Couturat plendas ankaŭ en posta letero al Bertrand Russell (30 dec. 1912) (Schmid, 2001):

*Nous sommes toujours dans les plus mauvais termes avec M. Peano, qui nous combat par derrière, avec l'appui des Espérantistes. Lui qui a pris part aux travaux de la Délégation et a plaidé pour son Latino, il refuse de reconnaître son œuvre, et il propage un jargon semi-italien [...]. Son opposition stupide, qui flatte l'amour-propre italien, ne sert qu'à retarder les progrès de l'Ido en Italie.*

Efektive, la celo de la projekto de Peano estas malsama de tiu de Couturat, kvankam ili startis de la sama punkto: havi komunan lingvon por la scienco, kaj tiun celon havis ja multaj sciencistoj, kiuj neglektis la bezonojn de komunikado de la ordinara popolo. Sed Peano restas cxe la ideo, ke gxin utiligu sciencistoj, dum Couturat estas trenita al lingvo, kiun povu uzi cxiuj, tia kia efektive estis planita Esperanto. Tial la lingvo de Peano aspektas forte itale, cxar gxi estas, ja, latino "sine flexione". Ido estas iom pli naturalisma ol Esperanto, tiel ke gxi estas pli ol Esperanto rekonebla cxe la unua vido, tamen ankoraŭfoje, nur de kleraj personoj kiuj konas la latinan aux cxiukaze latinidan lingvon. La leteraro entenas du leterojn de Couturat en Ido kaj unu en Latino sine flexione de Peano; ambaŭ estas tute kompreneblaj al persono kiu konas respektive Esperanton kaj/aux la latinan.

Couturat pledas, por ke aperu iu lia respondo en revuo direktata de Peano *Discussiones*, fakte ne specifa revuo, sed serio de fascikloj eldonataj de la *Academia pro Interlingua* (Roero, 2003), sed Peano ne tuj aperigas gxin. Couturat insistas, dirante, ke li ja publikigis en sia revuo *Progreso* kontribuon de Peano. La polemiko daŭras dum kelke da leteroj, kaj baldaŭ la rilatoj interrompigxas. Intertempe fondigxis la *Unione di l'Amiki di la linguo internaciona* kun Ostwald kiel prezidanto; do Couturat sentas sin liberigita de ia pezo devi surporti preskaŭ sola, kiel iniciatinto de la DALAI, la atakojn de la esperantistoj, de Peano kaj de cxiuj kontraŭuloj de la decidoj de la Komitato. Ekestas ankaŭ misgusta atako de Couturat kontraŭ la *Academia pro Interlingua*, nova akademio direktata di Peano, kiu iel heredis la volapukan akademion. Sed Couturat kontestas tion, laŭ li tia Akademio neniel estas akademio kiel scienca institucio, cxar ja oni eniras gxin simple pagante kotizon.

La lastaj leteroj de Couturat al Peano, en februaro 1910, estas tute sekaj: la iama komenco *Cher Monsieur* igxas simple *Monsieur*; la finaj salutoj transiras de *Recevez, cher Monsieur, l'expression de mes sentiments distingués et bien dévoués* al *Veillez agréer, Monsieur, mes salutations*. Couturat pluas per sia propagando por Ido, Peano disvastigas, pere de siaj revuoj, la uzadon de *latino sine flexione*, poste nomita *Interlingua*. Intertempe la polemikoj mildigxas, kaj cxiu favoranto de unu aux alia lingvo internacia uzas kaj propagandas la sian. La nova revuo en *Interlingua*, *Schola et Vita*, fondita kaj redaktata en Milano de Nicola Mastropaolo, al kiu kontribuas Peano kaj pluraj liaj disciploj, akceptas artikolojn en ajna internacia lingvo, sed fakte cxefe en *latino sine flexione*. La revuo ne estas matematika, sed pri lernejoj problemoj. Aliaj revuoj en diversaj internaciaj lingvoj plu aperos precipe en la periodo inter la du militoj (Barandovská-Frank, 2006).

#### Literaturo

**Barandovská-Frank, Vera:** *De latino sine flexione centenario. Ein Jahrhundert Latino sine Flexione.* (2003), Inst. f. [Kybernetik](#), *Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswiss.*, 44, Beiheft; 100 p.

**Barandovská-Frank, Vera:** Revuo Kosmoglot en interlingvistika fono, *Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswiss.*, 47 (2006), 4, p. 197-204.

**Bellavitis, Giusto:** Pensieri sopra una lingua universale, *Memorie dell'I. R Istituto Veneto di Scienze, Lettere ed Arti*, vol XI (1862), pp. 33-74.

**Luciano, Erika e Roero, Clara Silvia:** *Giuseppe Peano - Louis Couturat: Carteggio (1896-1914)*, Firenze, Olschky, (2005), pp. 258.

**Minnaja, Carlo:** Un carteggio tra matematici sullo sfondo di una lingua internazionale, *Language Problems and Language Planning*, 2 (2007), presata.

**Roero, Clara Silvia:** I matematici e la lingua internazionale, *Boll. Unione Matematica Italiana*, Sez. A, (1999), p. 159-182.

**Roero, Clara Silvia:** *L'Opera Omnia di Giuseppe Peano*, Cd-Rom, Dipartimento di Matematica, Università di Torino (2002).

**Roero, Clara Silvia:** *Le Riviste di Giuseppe Peano*, Cd-Rom, Dipartimento di Matematica, Università di Torino (2003).

**Schmid, Anne-Françoise:** *Bertrand Russell: correspondance sur la philosophie, la logique et la politique avec Louis Couturat (1897-1913)*, Paris, Kimé (2001).

**Vailati, Giovanni:** La logique mathématique et sa nouvelle phase de développement dans les écrits de M. J. Peano, *Revue de Métaphysique et de Morale*, VII (1899), p. 73-77.

*Adreso de la auxoro:* Prof. Carlo Minnaja, Dip. Matematica Pura ed Applicata, Università di Padova, Via Trieste 63, IT-35121 Padova

#### *Lettere di due interlinguisti all'inizio del ventesimo secolo (Riassunto)*

Il carteggio descritto, raccolto e commentato da Erika Luciano e Clara Silvia Roero, intercorre tra il matematico torinese Giuseppe Peano e il filosofo francese Louis Couturat. Si tratta di 101 missive tra il 1896 e il 1910, quasi tutte in francese, delle quali soltanto 4 sono di Peano, mentre le altre 97 sono di Couturat. Sono aggiunti altri 15 scritti inerenti al tema. Fino al 1899 gli argomenti trattati riguardano la logica e il *Formulaire de Mathématiques* di Peano, ma dopo riguardano quasi esclusivamente l'idea di una lingua internazionale per la comunicazione degli scienziati.

Entrambi vedono la soluzione in una lingua artificiale (adesso si direbbe "pianificata"): Couturat diventa un fautore dell'Esperanto, mentre Peano lancia il *Latino sine flexione*. Le missive riguardano il lavoro di Couturat per far accettare al mondo scientifico, che si riunisce in congressi di vario genere, l'idea di una lingua internazionale. Viene istituita una delegazione, che ha l'appoggio di accademie e scienziati singoli, e poi un Comitato che deve effettuare la scelta della lingua internazionale più adatta. Le lettere mostrano l'entusiasmo di Couturat per il problema e l'organizzazione, mentre Peano appare più tiepido; viene cooptato comunque nel Comitato e collabora ai suoi lavori che si concluderanno con la scelta di un Esperanto modificato che si chiamerà Ido. Couturat diffonderà quindi l'Ido con la stessa passione con la quale aveva propagandato l'Esperanto, ma Peano si stacca dalle decisioni del Comitato e Couturat ne rimprovera aspramente l'incoerenza. La morte di Couturat per un incidente automobilistico e il commosso necrologio fattone da Peano pongono fine alla polemica.